HAMBURG Esperanto

2/2008
Februaro/Marto
Bulteno de Hamburga
Esperanto Societo r. a.

# Zamenhoffesto 2007

La 8an de Decembro 2007 okazis la Zamenhoffesto en nia klubejo. Partoprenis 26 personoj. Sur la foto vi meze vidas nian membron Alvaro Cortés kaj sian filinon Amelie dum ŝi kantas Esperantan kanton. Maldekstre Rudi Haberland, dekstre Bill Mak (fotas), d-ro Werner Bormann kaj Adelheid Semrau-Kopp. Legu pli pri la festo sur la lasta pago.

**Editoraĵoj**
Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo r. a.*
Klaus-Groth-Str. 95, D-

**Karaj legantoj,**
nia kluba vivo en 2007 finiĝis per bonetosa **Zamenhofa festo**.

20535 Hamburg
Tel/Faks: +49 40 250 30 65

Prezidanto: *Jürgen Wulff*

Redaktoro: *Benno Klehr*

Retpoŝto: Esperanto-Hamburg

Redaktofino de

n-ro 3/2008: 15-03-2008

**Atentu**
ke tiun-ĉi numeron de Esperanto Hamburg redaktis la prezidanto. Do li kulpas pri eraroj ktp.

Kvankam kelkaj membroj mankis - Vesna partoprenis la 50-jaran jubileon de Esperanta klubo en Zagreb kaj Benno estis en malsanulejo en Berlin - ni havis vere kulinaran kaj amuzan vesperon. Dankon al ĉiuj kiuj kunorganizis kaj helpis dum la vespero. Dankon ankaŭ al tiuj kiuj dum la jaro 2007 prelegis aŭ aliel kontribuis al nia kluba vivo.

Por ke ni havu **viglan kluban vivon** ni bezonas ankaŭ vian helpon. Kontribuu al la programo. Ekzemple vi povas raporti pri vojaĝo kiun vi faris aŭ pri viaj hobioj krom Esperanto.

Ni ankaŭ bezonas vian helpon en la **estraro**. En Februaro la membraro elektos novan estraron. Do se vi volas kunlabori en bona teamo ni tre ĝojos!

Krome eble necesas ke vi **finance subtenu** nian klubon. Ĉar ni ĝis nun ne trovis posteulon por nia luanto eble nia sola ŝanco estas ke ni mem financu la domon. Sed tio ne eblas per la membro-kotizo.

Ĝis revido, espereble baldaŭ en nia klubejo!
*via Jürgen Wulff*

## Nia programo

| **Februaro** |
| --- |

| | |
|---|---|
| **7** | **Karnavala festo**<br>Ĉu kun aŭ sen kostumo - vi estas bonvena al muziko kaj amuzado |
| **14** | **Jarĉefkunveno**<br>Ĉiuj membroj estas invititaj veni. Okazos elektoj de nova estraro. |
| **21** | **Filmo: Historio de GEA**<br>prelego de Dr-o Ulrich Lins dum la GEK 2006 en Braunschweig |
| **28** | **Kviza vespero**<br>Kerstin Baasch denove instigos nian kreivecon. |
| **Marto** | |
| **6** | **50 jarojn Esperanta Klubo Zagreb.**<br>Vesna Staniĉiĉ-Burchards partoprenis la 8an de Decembro 2007 kaj raportos. |
| **13** | **Klubaj aferoj:**<br>La nova estraro prezentas siajn ideojn vivteni la klubon. |
| **20** | **Ovo konveno**<br>antaŭ-paska kunveno ekzakte je komenco de printempo. |
| **27** | **Kiel varbi por Esperanto**<br>Bonaj konsiloj por niaj publikaj prezentadoj. |
| Ni bezonas viajn kontribuojn al la programo. Anoncu viajn programerojn por April/Majo 2008 laŭeble baldaŭ. | |

## Mitgliedsbeitrag 2008

**Karaj membroj,**

da Spendenbescheinigungen bei Beträgen unter 100 Euro nicht notwendig sind (siehe folgender Text), werde ich dieses Jahr nicht automatisch für jedes Mitglied eine Spendenbescheinigung erstellen, sondern nur auf Anfrage.

Der Mitgliedsbeitrag beträgt 2008:
50 € normale Mitgliedschaft / Personen mit Einkommen
25 € Familienangehörige, Jugendliche, Mitglieder ohne eigenes Einkommen

12 € Kinder und Jugendliche bis 16 Jahren

Bitte überweisen Sie den Mitgliedsbeitrag bis zum 28.2.2007 auf das neue Konto des Esperanto-Vereins Hamburg e. V.: XXX (gelöscht in der Onlineversion wegen gehabten Missbrauchs)

Mitgliedsbeiträge und Spenden an HES können in der Einkommensteuererklärung geltend gemacht werden. Soweit die einzelne Zahlung 100 Euro nicht übersteigt, genügt es, den Zahlungsnachweis (abgestempelter Überweisungsbeleg oder Kopie des Kontoauszugs) zusammen mit der nachstehenden Erklärung einzureichen. Aus den Unterlagen muss erkennbar sein, ob es sich um einen Mitgliedsbeitrag oder eine Spende handelt. Bei höheren Beträgen wird Ihnen unaufgefordert eine Spendenbescheinigung zugesandt.

***Bescheinigung über Gemeinnützigkeit***

Der Esperanto-Verein Hamburg e.V. ist wegen Förderung des Völkerverständigungsgedankens nach dem letzten uns zugegangenen Freistellungsbescheid des Finanzamtes Hamburg-Nord in Hamburg vom 27.07.2006 unter der Steuernummer 17/420/07983 als gemeinnützigen Zwecken dienend anerkannt und nach Paragraph 5 Abs. 1 Nr. 9 des Körperschaftsteuergesetzes von der Körperschaftsteuer befreit.
Es wird bestätigt, dass die Zuwendung nur zur Förderung des Völkerverständigungsgedankens (im Sinne der Anlage 1 - zu § 48 Abs. 2 Einkommensteuer-Durchführungsverordnung - Abschnitt A Nr. 10 - zuvor Anl. 7 Ziffer 12 Einkommensteuerrichtlinien) und entsprechend der Satzung des Esperanto-Vereins Hamburg e.V. verwendet wird.

Kerstin Baasch, kasistino

**Pola Radio en la reto**

Se vi havas interretan aliron estas simple regule auskulti la Esperantan programon de Pola Radio. Ĉiutage la Esperanto-redakcio raportas aktualaĵojn el Pollando kaj la mondo kaj el Esperantujo. Ne plu necesas bona longonda radio por aŭskulti la programon. En la interreto vi simple alklakas la deziratan kaj jam eblas aŭskulti la elsendon en sufiĉe bona kvalito. Do provu mem: http://www.polskieradio.pl/eo/

**Jubilea Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio (DEA)**
La 18an - 20an de Aprilo invitas DEA al la 100-jara jubileo al Kopenhago. Por niaj membroj ni aldonas aligilon al tiu-ci (papera) informilo. Aliaj legantoj bovolu peti informojn de dea@esperanto.dk.

**Eppendorfer Straßenfest**
Dieses Jahr wird wieder das Eppendorfer Straßenfest stattfinden. Termin ist der 31. Mai bis 1. Juni 2008. Ob wir uns wieder mit einer Bude daran beteiligen, hängt davon ab, ob es genügend Freiwillige gibt, die Standdienst machen würden. Bitte melden Sie sich doch jetzt, wenn Sie Interesse daran haben, für Esperanto zu werben. Wir müssen uns jetzt entscheiden, ob wir teilnehmen wollen. Unterstützen beim Standdienst wird uns unser ehemaliges Mitglied Delia Pick. Um die richtigen Argumente und Vorgehensweisen zu finden, findet am 27. März 2008 als Klubprogramm "Kiel varbi por Esperanto" statt.

**Deutscher Esperanto-Kongress in Essen**
In diesem Jahr findet der 85. Deutsche Esperanto-Kongress in Essen statt. Termin ist der 9. bis 12. Mai 2007. Ein

Anmeldeformular befindet sich in Esperanto aktuell, Heft 5/2007, ist aber als Kopie auch im Verein erhältlich.

**Mielno en Pollando invitas**
En la tagoj 10 - 18 de junio 2008 okazos en Mielno la 30a Jubilea Ĉebalta Esperantista Printempo kun riĉa kaj varia E-programo. Ne perdu la okazon kaj venu Mielnon kune kun viaj geamikoj. www.esperanto.koszalin.pl

**Universala Kongreso en Roterdamo**

Ĉi-jare la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Roterdamo. Kiel vi certe scias, en Roterdamo trovigas la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Dua kialo por vojaĝi tien estas la proksimeco. Do ĉi-jare ne necesas vojaĝi al alia kontinento por ĝui la kongreson.

**Jarĉefkunveno 2008**

La 14an de Februaro 2008 ekde la 20a horo okazos la jarĉefkunveno de Hamburga Esperanto-Societo. Ĉi-jare necesas elekti novan estraron. Krome la estonta uzo de la kluba domo estos temo. La estraro petas ĉiujn membrojn veni al la kunveno por helpi vivteni la klubon kaj trovi solvojn.

La programo de la jarĉefkunveno:

1. jarraporto kaj kasraporto
2. raporto de la revizoroj
3. diskuto pri la raportoj
4. raporto de la konsilantaro
5. senŝarĝigo de la estaro
6. elekto de la estraro
7. elekto de la konsilantaro
8. elekto de la revizoroj
9. buĝeto kaj planoj por 2008
10. diskuto pri proponoj
11. diversaĵoj

Decidendaj estas jenaj gravaj temoj:

**Nia kluba domo**
Ĉu mem financi la domon au pli serci novan luanton au eĉ forvendi la domon? Kio tiam pri la biblioteko?

**La nova estraro**
Kiu pretas kunlabori en la nova estraro? La nuna prezidanto Jürgen Wulff ŝatus koncentrigi al la profesio kaj ne plu volas esti en la estraro. Laŭ la leĝoj pri registritaj organizoj necesas trovi novan estaron. Se ne eblas al la

membraro trovi novan estraron la klubo estos likvidita de la justicoficejo.

## Zamenhoffesto 2007

La festprelaganto estis Harald Schicke kiu rakontis kiel Esperanto helpis al li en la privata kaj profesia vivo. Li montris per projekciilo malnovajn fotojn kiu bone kaj foje amuze ornamis la prelegon.

Mariko Aoshima kun sia kuira teamo Hannelore Brunow kaj Jutta Sültz preparis tre varian kaj bongustan bufedon. Vegetaraj manĝoj, fiŝaĵoj kaj viando - por ĉiu gusto la teamo zorgis.

Krome okazis skeĉo prezentita de Pia Haasis kaj Ralph Glomp. Pia prilaboris kaj tradukis la amuzan skeĉon pri komplika kliento kiu serĉas kristnaskdonacon por la nova amikino.

Dankon al ĉiuj kiuj helpis kaj al la partoprenantoj. Se vi mankis, venu al la Zamenhoffesto 2008!

Re al Esperanto en Hamburg